

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Semajna

Kun senpaga monata „Revuo“

Neŭtrala

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpigo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko je germana banko.

La prezo de unu numero estas por la landoj:
Aŭstra 600 Kr. Ĉeĥosl. 1.20 Kr. Germana 20 Mk. Jugosl. 1.60 Din. Portugal. 0.50 Esk.
Belga 0.50 Fk. Finna 1.20 Fmk. (Germanoj abonu Kanada 0.06 Dol. Rumania 3 Lei.
Brita 3/4 Pc. Franca 0.50 Fk. ce sia poŝtoficejo) Nederl. 0.15 Hfl. Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levul. Hispana 0.50 Pes. Itala 0.70 Lit. Norvega 0.30 Kr. U. S. A. 0.06 Dol.
Dana 0.30 kr. Hungara 20 Kr. Japana 0.10 Jen. Pola 50 Mk.
Baltikanoj kaj rusoj demandu la prezon de sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. au 1 stampitan Respond-kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 41 Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 15 gmk); rabato laŭ interkonsento.

Semajnan kaj monatan gazeton vi ricevos de nun sen krompago. Du semajn gazetojn vi ricevos sampreze, se vi verbas sufiĉe da abonotoj kaj anoncoj.

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Norja, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)
Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Postĉekkonto Köln 70663, por Teo Jung, Horrem.
Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Butin.
Literatura red.: Zanon.
Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la tutmondo.

Numero 104 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 1. Oktobro 1922.

Esperanto en la Ĝen. Kunsido de L. d. N. (Ĵaŭdo, 21. sept.)

La Prezidanto, s-o Edwards (Ĉilio) petas la raportanton de la kvina komisiono, Senatanon Reynald, prezenti la demandon pri Esperanto kiel internacia helplingvo.

Senatano Reynald (Franc.) raportas pri la diskutoj kaj rekomendoj de la kvina komisiono, kiu dediĉis tri kunsidojn al tiu afero. Diversaj opinioj montrigis. Kelkaj membroj, kiel Ĉinlando, Japanio kaj Persio speciale subtenis rezoluciojn por rekomendi Esperanton en lernejoj kaj internacia poŝta kaj telegrafa servado. Aliaj, kiel Norvegio, Brazillando kaj Svedlando kontraŭstaris ĉiun intervenon de la Ligo de Nacioj en tia afero, kritikante la ideon de artefarita lingvo. Meza opinio gajnis, kiu konstatis faktojn kaj deziris opinionon de kompetenta sciencularo. Tio estas la senco de la konkludoj akceptitaj de la komisiono. Ĝi proponas, ke la Ĝenerala Kunsido aprobu ilin. Intertempe la lingvo Esperantista havos plenan kampon por disvastiĝi kaj pruvi sian utilecon kaj fortecon per la sukcesoj, kiujn ĝi gajnos.

Lord Robert Cecil (Sud-Afriko) deklaras sin favora al Esperanto. Pro tio li ĝojas pri la duobla decido de la komisiono. La Intelekta Komisiono devos memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem. En tia spirito, ĝi ekzameni vaste la problemon. Dume li konsideras kiel grandan sukceson por Esperanto la dokumentiĝan raporton, korektitan kaj akceptitan de la komisiono. Li petas la Ĝeneralan Kunsidon ĝin aprobi kaj konsilas al la Esperantistoj kuraĝe daŭrigi sian noblan laboron.

S-o Fielding (Kanadl.), prezidanto de la kvina komisiono, petas dividon de la voĉdono.

La Prezidanto balotigas la unuan parton (alprenon de la raporto pri Esperanto kiel helplingvo). Unuanime akceptita.

La Prezidanto balotigas la duan parton (peton al la Intelekta Komisiono doni sian opinion). Akceptita per 26 voĉoj kontraŭ 2.




L. d. N. Intervjuo kun s-o Chao-Hsin-Chu.

ag. — Redaktisto de la Telegrafa Agentejo de la Sviza Gazetaro (nia samideano s-o H. Unger; red.) parolis kun la ĉina „chargé d'Affaires“ en London, s-o Chao-Hsin-Chu, kiu partoprenas en la nunjara Kunveno de la Ligo de Nacioj en Ĝenève, kaj demandis lin pri lia intereso je tiu Kunveno.

„En la L. d. N.“ respondis la diplomato, „interesas min speciale tri aferoj: la malmarmado, Esperanto kaj la opio.“

Antaŭ ĉio mi subtenas la proponojn de Lord Robert Cecil, precipe la punkton pri ĝenerala malmarmado kaj la garantitan konvencion. La ĉina registaro decidis maldungi ĉiujn soldatojn iel superfluaĵoj kaj lasi nur tiom da trupoj, kiom estas absolute necesaj por gardado de la publika ordo. Kion Ĉinio deziras, estas paco kaj sekureco. Se oni povas doni al ĝi garantiton kontraŭ atakoj de ekstere, ĝi estas preta, akcepti la malmarmadan programon de la L. d. N. Koncerne la militŝipan malmarmadon mi kore subtenas la proponon de s-o Fisher, ĉar li aparte konsideras tiujn ŝtatojn, kiuj nuntempe ne disponas pri sufiĉe granda marmilita forto por sia defendo.

La helplingvon ni akcelas, ĉar en niaj rilatoj kun la cetera mondo ni tre suferas pro la multeco de lingvoj. Neŭtrala helplingvo, kiu estas la sama en ĉiuj landoj kaj kiu estas la unua fremdlingvo apud la gepatra idiomato, ŝajnas esti por mi la plej lojala solvo, ĉar finfine la lingva problemo estas demando de forto. Tial Ĉinio enkondukis Esperanton jam en multajn lernejojn; la Esperanta instruado tre baldaŭ fariĝos ankoraŭ pli ĝenerala. Ni deziras, ke la L. d. N. kuraĝigu la aliajn ŝtatojn de la mondo agi simile.



Plano de la Jubilea Ekspozicio Göteborg 1923.

La Ekspozicio de Göteborg 1923.

Konturo de la interesa ekspozicia plano.

La estro de la reklama oficejo de la ekspozicio de Göteborg volonte akceptis Esperanton por la reklamo. Tial nia movado multe gajnis, se ĉi tiu artikolo estus tradukata kaj enpresata en naciaj gazetoj. Bonvolu sendi 1-2 ekz. de ĉiu gazeto, kiu enpresos ĝin, al N. G. Nilsson, Lundgatan 5 v. 1-2, Göteborg 6, Svedio, Del. de UEA, por transdono al la reklama oficejo.

Göteborg, la plej grava havenurbo de Svedio, solenos 1923 la 300-jaran memoron de sia fondiĝo per jubilea ekspozicio, kiu kompare kun aliaj naciaj ekspozicioj estos neordinare ampleksa.

En tre oportuna loko, kun la ĉefenirejo en iuj proksimeco de la centraj urbopartoj, nuntempe

estas konstruata ekspozicia urbo, kiu same laŭ vasteco kaj laŭ grandeco de la domoj certe konkuras kun jam okazintaj ekspozicioj laŭ internacia karaktero.

La tasko de la ekspozicio solenigi la 300-jaran memoron de la urbo estas markata per serio da ampleksaj historiaj faktoj, en kiuj estos montrata bildo pri la progresado de la homa kulturo en la okcidenta Svedio. La programo montras faktojn por la historio de la urbo kaj la urba ĉirkaŭaĵo, por la historio de la militaferoj, por la historio de la arta kaj preĝeja kulturo, por la kulturo de la kamparanoj, la hejmvivado de la burĝoj kaj la pli altaj klasoj kaj kiel ĝi progresadis dum jarcentoj, la historio de la agrikulturo, la metio kaj la industrio ktp. Plue la komunuma, teknikaj kaj socialaj institucioj de la urbo estos montrataj. La progresado kaj nuntempa stato de la instruado estos rigardeblaj. La progresado de la komerco, navigacio, ŝipkonstruado kaj la fiŝkaptado de pratempo ĝis niaj tagoj estos montrataj. Ĉie estos

Pri opio Ĉinio faris ĉion por aplikadi la Hagan Konvencion de 1912, malpermesante la opian trafikon. Multaj opio-fumantoj forlasis sian pasion, kaj ĉiu, kiu ankoraŭ fumas opion, estas punata laŭleĝe. Tre malfacile estas por Ĉinio tute forigi la opian trafikon, ĉar en najbaraj landoj kaj kolonioj ekzistas ŝtataj monopoloj akcelantaj la produktadon de opio. Tial multe da opio kaŝe venas en nian landon. Alia malhelpaĵo estas la kontrabanda importado de morfio. Morfiaj injekcioj estas deokabe pli malutilaj ol fumado de opio; sed nia popolo estas efektive venenita per tiu drogo! En la nomo de mia registaro mi do alvokis la Ligon de Nacioj, por ke ĝi postulu, ke niaj najbaraj landoj absolute apliku tre severe la paragrafon 9 de la Hagan Konvencio. Tiucele mi proponis al la 5-a Komisiono de la L. d. N. rezolucion, kiu estos akceptita unuanime!

(Publikigu tiun intervjuon en naciaj gazetoj kaj sendu unu ekzemplaron al s-o redaktisto H. Unger, Ĝenève (Sviza), Poste Mont-Blanc. — La artikolo havas tre gravan propagandan valoron!)

Bruis la arbaro... Septembra Fantazio.

Grandpaŝe mi marŝis laŭlonge de senlima trarbara vojo. Kien mi iris — mi ne sciis. Fortportata per facila fruaŭtuna septembra venteto kaj per aro de memoraĵoj el malproksima estinteco, mi marŝis senhalte, nenien rigardante. Sola mi estis en la arbaro, en tiu majesta silento, kiu ne timigas, sed ekflugiligas nin. Sonore resonis miaj paŝoj sur la sekiginta tero. Ŝajnis, ke neniam finiĝos tiu arbaro. Hela subira lumo haltigis min. Antaŭ mi, malsupre, malproksime estis lago, kvileta, blua. Fosfore brilis ĝia akvo sub la sun-

radioj, sur la spegula supraĵo apenaŭ videblaj glititaj boatiĵoj kun blankaj veloj. Ĉe unu flanko de la lago la montoj — severa beleco de la naturo — estis multkoloraj: blindiganta neĝo sur la altaj kaj verdaj, densa verdaj ĝis la blua lago. Ĉe la alia flanko — kamparoj. Helaj dometoj kun ruĝaj tegmentoj dronis en verdaj, interrompita tie kaj tie ĉi per la grizaj rubandoj de ŝosea trairvojo. Mi eniris la arbaron. Centjaraj arboj flanke de junaj graciaj, fiere etendis la pezajn branĉojn, abunde kovritajn per folioj: rozaj, rozflavaj, rozruĝaj, tute flavaj, tute ruĝaj, neĝblankaj, verdaj, malhelverdaj — ĉiuj ili bruis murmurete. Ie ekkantis birdoj... Ie ekaŭdiĝis kvazaŭ akvofalo bruanta en la montaro... Ie ehis kvazaŭ homaj voĉoj... Kaj bruis la arbaro... Ĉu bela muziko aŭdiĝis en la densejo?... Ĉu karesemaj aŭ severaj sonoj ĝisflugis miajn orelojn?... Ĉu kantado, gamoj de muzikaj nuancoj enpenetris kaj plenigis mian koron?... Ne. Nur bruis la arbaro...

Violela vespera nebulo ekkovris la naturon. La arbaro plimallumiĝis... Kaj bruegis... senfine.

Nevole mi ĝin forlasis... Nevole... Ĉar la multkoloroj de la arboj kaj multsono de la arbara bruado inspiris apartan animstaton al mi... Ili unuiĝis en neretenebla ekkrio: Kantu la birdoj, murmuretu la folioj, bruu la arbaro! Veku en ni sentojn de belo, vivon! La vivo valoras la vivadon! Bruu la arbaro!...

N. Umanski.

La finnaj enigmoj.

Mallaŭte zumanta arbaro, kviete kuŝantaj lagetoj — jen eble kelkaj kaŭzoj, kiuj faris la finnan popolon meditema, silentema. Bruante saltantaj akvofaloj, la mistera heleco de la somera nokto

kolektata abunda moderna materialo kontraŭ la fundo de la historiaj kolektaĵoj, kiuj estos kolektataj kaj ordigataj je klara kaj facile studebla maniero.

Kompreneble la ekspozicio celas ankaŭ kiel eble plej forte propagandi por la sveda industrio kaj ties produktoj. Ĉi tio estos montrata per sveda eksport-ekspozicio, kiu estas unu el la ĉefpunktoj de la programo. Ĉi tie la sveda eksportindustrio prezentos siajn produktojn kaj provos montri, kie ties potenco en la internacia komerca konkuro estas trovebla. Per arango de kolektivaj ekspozici-faktoj prefere por la svedaj ĉefindustrioj oni volas montri la bonegan kvaliton de la sveda krudmaterialo, la perfektigon de la perlaboraj procedoj kaj metodo kiel ankaŭ la kvaliton de la produktoj. La eksport-ekspozicio ampleksos fakojn por minaj-rompado, fer-, ŝtal- kaj metalproduktejoj, fer-, ŝtal-kaj metalmanufakturo, por maŝina kaj elektra industrio, instrumentfabrikado, ŝton- kaj argilproduktejo, cemento-industrio, porcelano- kaj vitro-industrio, arbarperlaborado, ligno- kaj lignoprodukta industrio, lignopasta, papera kaj grafika industrio, por teksaj- kaj vestaĵ-industrio, led- kaj gumaj-industrio, kemia-teknika industrio kaj nutraj-industrio.

La artemio kaj la arindustrio havos apartan ekspozicion, en kiu oni volas montri per zorga elektado de la materialo, kia alta nivelo arta estas atingita, precipe dank' al serioza kaj celkonscia celado dum la lasta lardeko rilate ĉi tion.

La arto, kiu estis multe helpata en Göteborg, havos parte retrospektivan fakon (montrantan, kiel la okcidentborda naturo kaj popolvivado estis montrata per la arto dum la pasinta tempo), parte modernan fakon, kiu ampleksos tutan Skandinavion, tiel ke krom svedaj artistoj ankaŭ danaj, finnaj kaj norvegaj artistoj estas invitataj tie elmontri siajn artaĵojn. Oni esperas per ĉi tiu fakon montri plenan bildon pri la nuntempa arto.

Ekspozici-fako, kiu ankaŭ certe estos tre favore akceptata, estas la ekspozici-fako por eksterlande loĝantaj svedoj, kiu montras, kion svedoj prizorgis en fremdaj landoj, kaj kiom la sveda gento estas disvastigita sur la tero.

Kune kun la jubilea ekspozicio estos aranĝata granda kunveno de svedaj kampkulturistoj kun ekspozicio de brutaro, agrikulturaĵoj produktoj kaj maŝinaj agrikulturaĵoj, ktp.

Krom tio estos aranĝata Internacia ekspozicio de aerveturado — la unua en Skandinavio — kaj ĝardenekspozicio, kiu certe estos tre vigle studata de nordlandanoj kaj de loĝantoj de pli malproksimaj landoj.

kaj la fulmanta nordlumo de la vintra nokto — jen eble kelkaj kaŭzoj, kiuj ĝin faris poezia. Kaj ankoraŭ plu unu grava kialo: soleco, maldensa loĝantaro. Ĉar oni ne ofte renkontis alian homon, oni devis serĉi amikojn en la naturo kaj vivigi ilin. Aŭskultante la zumadon de betulo, oni ekaŭdis vortojn, ekaŭdis tutan kanton pri la suferoj konformaj al la suferoj de la homa koro. En la finna popolepoko, la fama Kalevala, ĉiuj objektoj vivas, parolas, suferas kaj ploras. Por finno estas facile trovi ĉi tiujn similaĵojn kaj metaforojn. Tion bone pravas i. a. la finnaj proverboj kaj antaŭ ĉio la enigmoj.

Oni konstatis konformajn inter kelkaj aferoj aŭ cirkonstancoj. Por pli facile memori la eltrovon, oni ĝin konservis en versa formo. Preskaŭ ĉiuj finnaj proverboj kaj enigmoj estas fanditaj en ritmojn. — Sed por kio oni volis ilin tiel zorgeme konservi? — Ili estis uzataj kiel programo en festoj. Tie oni kantis la malnovajn epopeojn pri la herooj de la „vorto“, de la spriteco kaj saĝeco. (Plej alte la finna popolo ŝatas ne heroojn de la glavo, sed heroojn de la prudento kaj de la kanto.) Kaj tie oni amuziĝis per solvado de la enigmoj. Ĉe oni havis certajn ceremoniojn por tiu solvado. Se iu ne ekkomprenis la sencan de tri enigmoj, oni lin pelis al „Hymylä“, iu mistika, stranga loko, kie la senspirtulon atendas ĉiuspecaj neagrablaj spertoj kaj ofendoj. La dirinto de la enigmoj nesolvitaj priskribas al la publiko la „Hymylä-vojaĝon“ kaj poste li malkovras al la reveninto la sencan de la enigmoj. Neniu ja volis sperti ĉi-tian hontigon, kaj — se eble — provis poste rekompenci sian ofendon sammaniere.

Eble la legantojn intereseas kelkaj specimenoj, ĉerpitaj el la sennombra finna enigmaro.

La sporto estos reprezentata parte per historia fako interne de la jubilea ekspozicio, parte per internaciaj sportkonkuroj, kiuj laŭ la amplekso preskaŭ estos kompareblaj kun la Olimpiaj sportkonkuroj.

Granda kaj moderne aranĝota amuzejo prezentos mallacigajn kaj amuzajn, krom tio ĉiamaniere estos zorgate pri la plezuro kaj komforto de la ekspozicio-vizitantoj tiel interne de la ekspoziciloko kiel ankaŭ ekster ties limoj.

Konsiderante, ke Göteborg estos renkonto por multnombraj kongresoj de internacia, skandinava kaj nacia amplekso, oni certe ne eraras, se oni antaŭdiras, ke la urbo dum la ekspozicisolomero estos centro por vigla internacia trafiko.

Por la naciaj Esp.gazetoj.

Respondo al s-o Józef Litauer.

(Vidu ET n-o 95.)

Mi kredas, ke nun, en epoko de klopodoj ĉe la oficialaj aŭtoritatoj de ĉiuj landoj, la naciaj gazetoj estas tre necesaj kaj utilaj:

1. Ne estas eble propagandi Esperanton en ĉiuj landoj per la samaj argumentoj, ekzemple en Francujo, kie la registaro malfavoras Esperanton, aŭ en la malgrandaj ŝtatoj, kies lingvoj neniam ludis internacian rolon. Celo de naciaj Esp.gazeto estas kolekti ĉiujn novajn argumentojn laŭ nacia vidpunkto.

2. Multaj demandoj de propagando, organizo kaj la kroniko de la nacia movado ne povas interesi la internacian Esp.gazetaron, kiu bezonas dekojn da paĝoj por presigi tion.

3. La nacilingvaj propagandaj artikoloj povas esti disdonataj en la koncernaj medioj. Ekzemple, „France-Esperanto“, kiu presigis serion da propagandaj artikoloj de francaj eminentuloj (prof. Aulard, generalo Bastien, advokato Maria Verone ktp.), dissendis ilin ĉu senpere ĉu pere de la aŭtoro en la koncernaj medioj.

4. La eldonado de nacilingvaj bultenoj, folioj kaj informoj, laŭ la projekto de s-o Litauer, el financa vidpunkto estas multe pli kosta ol eldono de nacia gazeto.

5. La propagando en la nacia gazetaro devas esti starigata laŭ tute alia plano ol eldono de Esp.gazeto. Ĝi postulas rapidecon kaj precizecon kaj neniel povas anstataŭigi Esp.gazeton.

A/o, Paris.

Kial ni kongresas nacie?

Kiam en la jaro 1905 la unuaj Esperantistoj kongresis en Boulogne s. mer., ili komprenis la gravan rolon de universalaj kongresoj, kaj entuziasmigitaj pro la facileco sin kompreni per helpa lingvo internacia, ili decidis, ke ĉiujare oni kongresu en urbo de alia nacio. La eksperimento praktika montris al Esperantistoj kaj al neesperantistoj, ke per Esperanto homoj el plej diversaj landoj povas facile interkompreni kaj diskuti pri la plej diversaj aferoj. Ni ofte al ni demandis, kial oni ne uzis ĉefe tiun ĉi gravan faktoron por propagandi niajn lingvon kaj por ĝin pli ofte apliki. Ni opinias, ke oni eraris pri la ĉefa rolo de niaj kongresoj. Oni pensis per ili solvi la gravan demandon pri nia organizado, kaj oni ne pensis, ke organizon ni jam havas kaj oni ne devas havi alian. Lingva Komitato ekzistas, do oni donu al ĝi la necesajn nomrimedojn kaj personan helpon same kiel al Centra Oficejo de Paris.

En ĉiu nacio oni organizu eldonadon de bonaj gramatikoj kaj internacie per helpo de grava eldonanta firma, kiel nun okazas en Germanujo, oni

povos organizi eldonadon de internaciaj verkoj kaj literaturaj. Cetere ni tute ne bezonas alian organizon. Oni ne devas forgesi, ke Esperanto ĝi estas religio aŭ partio, ĝi estas lingvo, kaj sufiĉas havi la rimedojn por ĝin lerni kaj apliki.

Do la Esperantaj kongresoj estas la ĉefaj kaj pli oportunaj okazaj por propagandi kaj praktike apliki Esperanton.

Sed ĉiujare unu internacia festo en unu loko estas tro malmulta. Ni devas havi pli da okazoj por montri la praktikecon de Esperanto kaj por ĝin apliki. Ni do proponas, ke la nunaj naciaj kongresoj ĉesu sin okupi pri organiza demando kaj oni organizu ĉiujare en alia urbo de ĉiu nacio internacian Esperantan tagon. Ni fiksu definitive en la komenco de la jaro la datojn de tiuj internaciaj Esp. tagoj, por ke ni povu havi veran kalendaron de tiuj kunvenoj. Tiamaniere laŭ la oportuno pri la tempo kaj la loko ĉiu prizorgos kunveni en iu aŭ alia nacio.

La kunvenoj estu organizataj tiamaniere, ke ni havu grandan publikan kunvenon, al kiu oni devas inviti kiel eble plej multajn aŭtoritatojn kaj urbanojn; parolos Esperantistoj de diversaj nacioj, kun mallonga resumo en lingvo nacia, kaj ni montros praktike, kiel oni povas interkompreni per helpa lingvo. Poste okazos teatraĵo en Esperanto, festeno, ekskursoj ktp. Ni do gastigos la fremdajn samideanojn kaj helpas por viziti la urbon ktp. Ĉiujare ni kunvenos en alia urbo; tio estas certe la plej bona propagando.

Sajnas al ni, ke estas nun la tempo ĉesi kongresi nacie pri Esperanto kaj pli oportune komenci en ĉiu nacio kunveni internacie por apliki kaj propagandi praktike per Esperanto.

D-ro Alfredo Stroboli,
Torino (Italujo).

Kosmoglott kaj Occidental.

La societo Kosmoglott en Reval sendis al ni t. n. „Justigon“ pri artikolo aperinta en ET n-o 89. Ĉar de la aŭtoro de l' artikolo, s-o P. St., ni ne povis ricevi ĝis nun respondon pro lia forvojaĝo aŭ transloĝigo eksterlanden, ni represas ĉi-sube la klarigojn de Kosmoglott, samtempe deklarante, 1. ke la „justigo“ neniel povas konvinki nin pri intencaj „kalumnioj“ de s-o P. St., kaj 2. ke per kunigo de „Kosmoglott“ kun „Occidental“ la societo efektive forlasis la vojon de neŭtraleco, de „libera interŝanĝo de opinioj pri diversaj sistemoj de mondlingvoj“ kaj fariĝis fakte partia. La laboro de la societo Kosmoglott supozeble ne domagis al la ideo de lingvo internacia, sed per sia kunigo kun „Occidental“ (i. e. apogo al difinita sistemo) la Kosmoglottanoj efektive fariĝis „nevroforoj“ (mortopuntoj), se ankaŭ en iom alia senco ol s-o P. St. supozas.

Jen la „justigo“ de Kosmoglott:

En ET n-o 89 s-o P. St. en artikolo „Nekroforoj“ inter alie diras, ke la societo Kosmoglott ne ekzistas. Tiu aserto estas ne vera:

1. La Petrograda societo K. naskiĝis el unuigo de aŭtoroj de novaj sistemoj mondlingvaj, kun celo de propagando de ĉiuj el ili; kaj aliaj personoj interesitaj je la ideo.

2. Krom la mortinta s-o Rosinberger kaj s-o Petraŝevič, kies sorto estas nekonata, ĉiuj aktivaj membroj de la Petrograda societo estas membroj de la nuna Revala societo Kosmoglott, kiun ili ĉiuj rekonis. En tiu senco ni havis komunikaĵojn de s-o Baudouin de Courtenay, Čeŝihin, Juŝmanov, Ŝmurlo kaj aliaj. Kontraŭ la restarigo de la societo en Reval ne estis eĉ unu kontraŭdiro. La aŭtoro mem de la artikolo „Nekroforoj“ s-o P. St. (Petr Stojan) skribis al mi jenon: „Antaŭ ĉio mi dankas Vin pro aŭto-entendo de Kosmoglott... Estis al mi tre agrable sciigi, ke Vi kaj Wahl daŭrigas laboron pri la ideo de komuna lingvo, ĉiam al pli granda perfekteco... Mi multe dankas Vin por la propono kalkuli min kiel membron de K., kvankam mi dubas estos utila al Vi, ĉar nun min interesas praktika apliko de Esperanto.“

3. La statuto de la societo K. estas registrita de Estona registaro sub n-o 295, kaj la nombraro de la membroj (anoj

tiu de la popola poezio — la popolo perdis ilin. Oni ne devis plu penigi sian kapon por konservi en memoro ofte dekmilojn da versoj — ĉio ja estas presita. Sed tiamaniere la povo mortas. Oni ne plu elpensas novajn enigmojn. Ĝis nunaj tagoj la popolo tamen tre volonte ankoraŭ ludas per enigmoj, almenaŭ en kelkaj regionoj. I. L.

La agloj.

Laŭ J. S. Machar.*

Alte sur Tajgetos', kie herb' ne kreskas aŭ floro,
kien pro timo nek hom' nek besto grimpi kuragaŝ,
hejmas la aglo.

Aeroj estas lia tron' kaj lia edziĝ-kamero,
profunde sub li la ter' kaj li rigardas fiere
rekte en sunon.

Se per la varm' de l' korp' el kalkaj ovseloj
ellogis aglino jun-birdojn, alflugas la aglo
ilin esplori.

En la nest' viciginte la idojn kontraŭ la suno
kaj iliajn okulojn atente enrigardante
provas li specon.

Ĉar nur de l' aglo okul', nur sango el lia sango
povas rigardi en sunon; se ili rigardas,
do li la patro.

Sed se palpebrumado perfidas en ili bastardojn,
kun dishakitaj kranioj li jetas ilin abismen —
nutron al vermoj.

Esperantigis D-ro Emil Pfeffer.

*J. S. Machar estas la plej eminenta el nuntempaj vivantaj ĉeĥaj poetoj. Lia ĉefverko estas: „La konscienco de la tempo“, okvolvula poezia kulturhistorio de la homaro. Ĉi-supra versaĵo estas elprenita el la unua ciklo de la nomita verko, kies titolo estas: „En la ardo de l' helena suno“. (Rim. de l' Trad.)

de plej diversaj sistemoj) estas nun duoble pli granda ol en Petrograda tempo. Tri membroj de ĝia Komitato estas konataj estonaj Esperantistoj.

4. La revuo „Kosmoglott“ laŭ la spirito de la societo servas al libera interŝanĝo de opinioj pri diversaj sistemoj de mondlingvoj, kaj en tiu senco estas senpartia. La societo K. tute ne identigas sin kun Occidental de s-o Wahl, sed lasas al li sur la paĝoj de la revuo liberecon de opinio, same kiel al ĉiuj aliaj opinioj, ankaŭ en aliaj lingvoj.

Reval, la 28. junio 1922.

En komisi
de la Komitato de la Societo Kosmoglott:
J. Lintbach, prezidanto.

17-a Skota Esp. Kongreso.

Ĉi tiu kongreso okazis en Aberdeem la 22. ĝis 24. de Septembro. Prezidis s-o George Jarvis, Aberdeem, kaj reprezentantoj ĉeestis el diversaj urboj en Skotlando. La anoj de la Aberdeem'a grupo faris belajn aranĝojn por la vizitantoj al la „Granita Urbo“, kaj matene ekskursoj al la vidindaĵoj okazis. Posttagmeze la jarkunveno de la Skota Federacio okazis, kiam oni elektis s-on David Kennedy, M. A., Glasgow, Prezidanto por la estonta jaro, kaj f-ion Agnes G. Mactarlane, 234, Dumbarton Road, Partick, Glasgow, denove sekretariino. En la Kongresa Kunveno en la Universitato post salutoj de diversaj kongresanoj kaj legado de telegramo de D-ro Privat, kiuraportis la sukceson ĉe la Ligo de Nacioj, s-o Page, Edinburgo, aludis pri la nova organizo de la Esperantistoj, kaj pri la graveco de la Raporto aprobita de la Ligo de Nacioj, kiun li juse ricevis. Li proponis, ke oni sendu graniton el Aberdeem kiel donacon al la monumento al Zamenhof en Vaŝovio. Vespere granda publika propaganda kunveno okazis en la Universitato sub la prezidanteco de lia Moŝto la Episkopo de Aberdeem kaj Orkney. La episkopo, ne lerninte Esperanton, bone komprenis ĝian internan signifon, kaj subtenis la movadon. Paroladoj sekvis, s-o Jarvis pri Esperanto en Aberdeem, s-o Page pri Esp. ĉe Ligo de Nacioj, s-o Warden pri Esp. ĉe Kongresoj, s-o Young pri la Konferenco de Edukistoj en Genevo. Oni atentiĝis pri la fakto, ke antaŭ preskaŭ 300 jaroj George Dalgarno el Aberdeem elpensis universalan lingvon kaj estis pioniro de nia ideo. Dimanĉon Pastro Beveridge predikis en la „West Parish Church“ laŭ la teksto: „En espero, ĝoja“.

La 100-a Numero kaj la Lit. Aldono

trovis unuaniman aprobon. Jam ni konstatas plimultiĝon de la abonantoj. Tio donas al ni novan kuraĝon pliperfekti ET.

Por montri al niaj abonantoj nian bonan volon, ni de nun aldonos senpage la ĝisnunan Literaturan Aldonon en nova, pli eleganta aranĝo kun titolo kaj laŭ formo de

„Revuo“.

Komence la „Revuo“ aperos monate: konforme al la kreskado de la abonataro ĝi povos aperi pli ofte. Kiel ofte — tio dependos de via bonvolo.

Nia „Revuo“ estos ne nur literatura, sed povos pritrakti ankaŭ aliajn temojn de ĝenerala intereso, ekz. pri arto, historio, socia ekonomio, kulturprogreso ktp.

La unua numero de la „Revuo“ aperos en oktobro.

Ni esperas, ke tiu nova pliperfektiĝo ankoraŭ pli fortigos la konfidon je ET, kaj ke la tuta Esperantistaro baldaŭ konvinkiĝos pri la utilo de energia subteno al unu granda serioza gazeto.

Germanaj poŝtabonantoj, kiuj pagis monon por la Literatura Aldono, ricevos, anstataŭ la Lit. Ald., saman nombron da ekzempleroj de la (baldaŭ aperia) speciala numero pri Nürnberg por propagandi celoj. Kiu tion ne deziras, bonvolu informi nin.

Fabloj.

De P. A. Schettler.

La vojo al la alfeco.

„Mi ne scias, kial mia kolego, la turkoko, havas tiel altan rangon,“ diris la doma virkoko; „ĝi ne kriis kaj ne bezonas grati en la sterko por siaj kokinoj.“

„Ĝi turnas sin laŭ la vento,“ murmuris lakone la korta hundo; „tiaj homoj ordinare atingas tre altan pozicion.“

Sturno kaj kukolo.

„Kia impertinenteco!“ insultas la sturno la kukolon, „ke vi metas viajn ovojn en fremdajn nestojn.“

„Impertinenteco vi nomas tion, ke mi konfidigas miajn infanojn al aliaj?“ rediris la kukolo. „Ĉu kontraŭe tio ne atestas eksterordinaran neprofitemon?“

Iluzioj pri grandeco.

„Ĉu mi malsuperas la lagon koncerne belecon?“ fanfaronis ekbrilante vanta pluvmarĉeto. „Ankaŭ en mi speguligaĵas ĉielo, suno, luno kaj steloj.“

„Ĉu vi ankaŭ formas ondojn?“ demandis la vento kaj blovis, ĝis kiam la marĉeto malaperis sekiĝinte.

Diversa profesio.

„Vi vivas kiel vera mallaboremulo,“ ekflamiĝis la pasero kontraŭ la grasa arborano sidanta en sia glaso ĉe la fenestro; „dum mi devas kolekti mian nutraĵon, la rostajoj kaptitaj kvazaŭ flugas en vian buŝon.“

„Vi parolas laŭ via kompreno,“ rediris la rano; „vi ne konsideras, kiom min cerbumigas la veterfarado, tion vi tute ne supozas.“

Juristaro.

Al la tutmonda juristaro.

En la vivo de ĉiuj popoloj la juristoj ludas gravan rolon, kiel gvidistoj de l' rajto. Ilia laboro limiĝas ne nur je la juĝeja agado; ili estas danke al posedata scienco de publika vivo pli kompetentaj ol aliaj en ĉiuj flankoj de socia agado: tial plei bonaj politikistoj, plej seriozaj publicistoj estas ĉiam: juristoj.

Bedaŭrinde tamen ĝis nun la juriscienca instruado estis ĉiam tro nacia. En universitatoj la alilandaj juro estas ĉiam studata nur iomete kaj estas pro tio forgesataj tuj post la ekzamenoj. Dumtempe vivkondiĉoj sanĝiĝis kaj nun pure nacia juriscienca ne plu sufiĉas. Jam apenaŭ rimarkebla privata internacia juro nun iĝis grava parto de legoscienca. Fondiĝas novaj ŝtatoj, kreiĝas novaj leĝaroj, kiuj devus kontentigi ĉiujn novkonigitajn popolojn, sed juristoj ne plu estas sufiĉe kompetentaj, ĉar ili estas tial nur en la ŝtato, kie ili studis jurisciencon.

Aliflanke internacia komercio kreskas ĉiutage kaj certe kreskos ĉiam tro nacia. En universitatoj la alilandaj juro estas ĉiam studata nur iomete kaj estas pro tio forgesataj tuj post la ekzamenoj. Dumtempe vivkondiĉoj sanĝiĝis kaj nun pure nacia juriscienca ne plu sufiĉas. Jam apenaŭ rimarkebla privata internacia juro nun iĝis grava parto de legoscienca. Fondiĝas novaj ŝtatoj, kreiĝas novaj leĝaroj, kiuj devus kontentigi ĉiujn novkonigitajn popolojn, sed juristoj ne plu estas sufiĉe kompetentaj, ĉar ili estas tial nur en la ŝtato, kie ili studis jurisciencon.

Aliflanke internacia komercio kreskas ĉiutage kaj certe kreskos ĉiam tro nacia. En universitatoj la alilandaj juro estas ĉiam studata nur iomete kaj estas pro tio forgesataj tuj post la ekzamenoj. Dumtempe vivkondiĉoj sanĝiĝis kaj nun pure nacia juriscienca ne plu sufiĉas. Jam apenaŭ rimarkebla privata internacia juro nun iĝis grava parto de legoscienca. Fondiĝas novaj ŝtatoj, kreiĝas novaj leĝaroj, kiuj devus kontentigi ĉiujn novkonigitajn popolojn, sed juristoj ne plu estas sufiĉe kompetentaj, ĉar ili estas tial nur en la ŝtato, kie ili studis jurisciencon.

Ankaŭ ofte la juristoj de ia lando, ĉu laborante por krei novan leĝon pri ia speciala vivdumando, ĉu kodifikaĵe la leĝojn de ia ŝtato, kliniĝas antaŭ kvazaŭ ne forigeblaj malfacilaĵoj, — tute ne sciante, ke en la ŝtato, kies lingvo ne estas sufiĉe konata fremdlande, en la simila kondiĉoj oni solvis la saman demandon tute kontentige. La organizo de Esperantistoj-juristoj povos al ni faciligi la taskon, publikigante, per helpo de siaj membroj ekzemple, novajn gravajn leĝojn de ĉiuj landoj en speciala esperantlingva bulteno.



D-ro Rob. Fanta, Braşov (Kronstadt) kun gelnertinoj en Odorhei, Rumanio.
(Meze: D-ro Fanta, dekstre: I-lno Rozinio Csaky, maldekstre: Julio Szabo)

D-ro Rob. Fanta, m'lnova samideano el la jaro 1910, propagandis senĉe en Rumanio nian lingvon. Li gvidas kursojn laŭ nova senpera instrumetodo, ne uzante iun nacian lingvon. Per tiu nova metodo, aplikebla en ĉiu lando, li atingis jam multajn sukcesojn, kaj inter liaj kursanoj trovas sin eminentaj samideanoj (ekz. D-ro Champian, prezidanto de Rumanlanda Esperantistaro, kaj inĝeniero E. Balas, Rumanlanda Senatano), kiuj rapide kaj perfekte lernis Esperanton. S-o D-ro Fanta kiu estas Esp. propagandisto, oratoro, verkisto kaj instruisto, intencas instrui laŭ la nova metodo eksterlande kaj volonte gvidos en aliaj landoj kursojn en profesoriaj kaj instruistaj rondoj.

Musosageco.

Muso sin ŝovis ĉirkaŭ kaptilon, en kiu peco da lardo kuŝis. „Tula risko estas duona gajno!“ ĝi diris, rampante en la metafadenan domon kaj estis — kaptita. „Ho! Kiel malmulte oni povas fidi al proverbo!“ ĝi plendis ĝemante.

„Kial vi ploras?“ pepis envie ĝia najbaro; „ĉu la peco da lardo nun ne apartenas al vi?“

Tradukis P. Trarbach.

Humoro.

La ordeno.

Lernejinstruisto ricevis ordenon okaze de sia pensiĝo. Je la lasta instrutrago la lernejinpektoro parolis antaŭ la infanoj pri la meritoj de l' instruisto. „Nu, Karleto, ĉu vi ankaŭ scias, pro kio via instruisto ricevis la ordenon?“

Karleto: „Jes, tial, ke instruadon li ne plu faros.“

Danko de ET.

La redakcio kore dankas al s-o Fufisaia, sekretario de D-ro Nitobe, s-o Isch, oficisto ĉe la Sekretariejo de L. d. N., s-o D-ro Edm. Privat, vicprez. de UEA, red. de „Esperanto“, kaj s-o H. Unger, red. de „Int. Komercia Revuo“, pro ilia afabla kunlaboro per rapida sendo de raportoj kaj fotografiaĵoj koncerne la Kunsidon de L. d. N. pri Esperanto.

